


# *BONVENON*

## *La Bahaa Templo*

de la Nordamerika Kontinento – Wilmette, Ilinojso

Estante unu de nur sep bahaaj temploj ekzistantaj en la nuntempa mondo, ĉi tiu unika konstruaĵo reprezentas unuecon kaj invitas preĝi al Dio. Kvankam ĉiu el la mondaj temploj krakteriziĝas per propra specifa stilo, ili havas komunajn trajtojn: ĝardenoj ĉirkaŭas la naŭflankan centran konstruaĵon, kiun kovras majesta kupolo (tio simbolas unuecon de ĉiuj homojkaj religioj sub unu Dio).

La inaŭguro de la templo en Wilmette okazis en 1953 post pli ol 30 jaroj de ĝia konstruado. Franc-kanada arkitekto Louis Bourgeois laborisdum ok jaroj por krei taŭgan konstruplanon por tiel nobla projekto. Por transformi la desegnaĵojn de la Burgeoisa plano, el kiuj kelkaj konsistis el 109 futojn longaj paperpecoj, al daŭripovaj ornamaĵoj estis aplikata tute nova teknologio. La betonaj paneloj estis kreataj el miksaĵo de kvarcaj kristaloj kaj blanka cemento porakiri la labirintan, brilan surfacon de la konstruaĵa ekstero. Centoj da detale kalkulitaj kaj precizigitaj fragmentoj estis pendigataj sur la fera skeleto de la templo. La adorejo en Wilmette estas listigita en la registro de usonaj historiaj lokoj kaj estas nomita unu el sep gravaj vidindaĵoj en la ŝtato Ilinojso.

### Unu Sankta Spaco

La granda konstruaĵo kune kun la ĝardenoj formas unu sanktan spacon, en kiun ĉiuj estas invitataj preĝi al Dio kaj mediti en la etoso de beleco kaj lumo. La Bahaa Kredo aprezas la valoron de beleco. La Dia Vorto, dissemata en iu ajn epoko, estas same bela kaj praktika, indikante la koncepton de renovigo de la civilizacio.

### La Bahaa Kredo – Religio de Unueco

La Bahaa Kredo estas sendependa monda religio, praktikata tutmonde de pli ol 5 milionoj da homoj de preskaŭ ĉiuj nacioj kaj etnaj devenoj. Ili estas allogataj al tiu religio pro la konvinko, ke ni ĉiuj apartenas al unu homa gento, ke ĉiuj religioj posedas komunan fonton kaj celas la samon, kaj ke la longatendata erao de paco, promesita de Dio en la plej sanktaj skriboj, estas atingebla nun.

**Inter la bazaj principoj de la Bahaa Kredo estas:**

- forigo de ĉiuj formoj de antaŭjuĝo;
- egaleco inter viroj kaj virinoj;
- harmonio de scienco kaj religio;
- monda paco, gardata de monda registaro;
- spirite bazitaj solvoj de ekonomiaj problemoj;
- ĝenerala edukado.

### Kio faras la Bahaan Religion unika: Progresa Revelacio

Bahaanoj kredas, ke tra la historio Dio ree manifestis Sin kaj Siajn instruojn al la homaro pere de pluraj Mesaĝistoj de Dio vivintaj en la fora pasinteco, kiel Abrahamo, Moseo, Kriŝno, Budho, Zoroastro, Kristo kaj Mahometo.

La misioj de tiuj Mesaĝistoj de Dio formas la sinsekvajn etapojn en la spirita evoluo de la civilizacio. Bahá'u'lláh estas rekonata de la bahaanoj kiel la ĝis nun lasta de la Mesaĝistoj de Dio, kiu estis promesita por nia epoko.

### La Historio de la Bahaa Religio


La Bahaa Religio estis fondita en Persio (nuntempa Irano) fare de Mírzá Ḥusayn-'Alí (1817-1892), konata kiel Bahaullah (Bahá'u'lláh), kio signifas "Splendoro-Gloro-Lumo de Dio". Lia misio de la plej juna Mesaĝisto de Dio, devinta servi en la epoko de la mondpaco, estis heroldita de Siyyid Ali-Muhammad (1819-1850), kiu estis konata kiel "Báb", kio signifas "La Pordego".

### Esperanto


Pro la instruado de Sia religio Bahaullah pasigis la plejparton de Sia vivo kiel malliberulo aŭ ekzilito sub persa kaj turka regado. En la jaro 1868 Li estis malliberigita en palestina Akko (Acre en nuntempa Israelo), kie Li mortis en la jaro 1892. Bahaullah esprimis la deziron ke la centro de Lia Kredo estu starigita en la regiono de Akko kaj Hajfo.

### La Templo reprezentas Lumon kaj Unuecon

La arkitekto de la templo, Louis Bourgeois, uzis ornamaĵojn por ilustri kaj celebri lumon – la lumon de la nova revelacio de Dio, transdonita pere de Bahullah. Nek orienta nek okcidenta, la aspekto de la templo respegulas neniun specifan kulturon, formante unikan konstruaĵon, al kiu loĝantoj de la mondo de ie ajn povas veni kaj uniuĝi en preĝado.



**LA SIMBOLO** ĉe la pinto de la kupolo enhavas arabajn vortojn "Yá Bahá'u'l-Abhá" – preĝo aŭ invoko signifanta "Ho, Gloro de la Plej Glora".



*"En la ornamaĵoj de la turoj kunplektiĝas ĉiuj religiaj simboloj de la pasinteco, invitante ĉiujn ajn anojn de diversaj religioj: bonvenon en ĉi Templo, kiu simbolas universalan fratecon."* – Louis Bourgeois

### Vigla Komunuma Vivo

Bahaanoj kunvenas por krei amemajn, subtenemajn kaj viglajn komunumojn. La okazaĵoj, celebradoj kaj projektoj estas oferataj al ĉiuj, kiuj volas partopreni. Jen kelkaj ekzemploj de la aktivaĵoj:

+ **Kunagaj studgrupoj**, en kiuj temoj kiel "celo de la vivo" kaj "naturo de la spirito" estas pristudataj kaj diskutataj.

+ **Preĝaj kunvenoj** dum kiuj la kredantoj de ĉiuj religioj kaj de iu ajn deveno kolektiĝas por preĝi en amema etoso.
+ **Porinfanaj klasoj** por diversmetode disvolvi moralajn kaj spiritajn valorojn kiel ekzemple fidindeco, justeco kaj ĝentileco.
+ **Junularaj plifortigaj programoj** por helpi la junulojn memfirmiĝi per studado, servado, amikeco kaj arto.

## La Bahaa Kredo en Usono

La Bahaa Kredo konstante kreskadas en Nordameriko post kiam oni enkondukis ĝin dum la Monda Parlamento de Religioj en Ĉikago en 1893. Pli ol 155 000 bahaanoj loĝas nun en Usono; ili troviĝas en ĉiu ŝtato de la Unio, inkluzive de pli ol 100 indianaj rezervejoj. La plej multnombraj bahaaj komunumoj ekzistas en Kalifornio, Georgio, Ilinojso, Suda Karolino kaj Teksaso.

La Bahaa Religio posedas neniujn pastrojn; la administradon prizorgas loke, nacie kaj internacie elektataj oficistoj. La Usona Bahaa Nacia Centro troviĝas en Evanstono, Ilinojso.

## Por Lerni Pli Pri la Bahaa Kredo:

Bahaanoj organizas tutmonde studgrupojn, preĝkunvenojn kaj porinfanajn klasojn, en kiuj ĉiu povas partopreni. Por trovi bahaanojn proksime al vi, telefonu 1-800-22UNITE (1-800-228-6483) aŭ vizitu www.bahai.us. Por pliaj informoj pri la Bahaa Religio en **Esperanto** rigardu: http://bel.bahai.de

Ĉiuj estas invitataj partopreni la ĉiutagajn diservojn en la aŭditorio, same kiel en la enkondukaj kursoj, studgrupoj, neformalaj kunvenoj kaj vizitado de la vizitcentro. Por ricevi pluajn informojn pri la Bahaa Kredo kaj kiel kontakti bahaanojn proksime al vi, bonvolu plenigi la petkarton. Ankaŭ bonvolu preni la multlingvajn informajn publikaĵojn.

**Oni fariĝas bahaano** per agnosko, ke Bahaullah estas la Mesaĝisto de Dio de nia tempo, per promeso sekvi Liajn principojn kaj instruadon, kaj deklarante al bahaa komunumo tiun promeson.

**Nur bahaanoj rajtas fari financajn kontribuojn**

Ĉiuj kostoj, ligitaj al la aktivecoj de la bahaa komunumo, estas kovrataj de la libervolaj kontribuoj fare de la bahaanoj de la mondo. Tiu kontribuado estas konsiderata kiel spirita privilegio, rezervita por la membroj de la Bahaa Kredo. Financaj kontribuoj ne estas akceptataj de personoj, kiuj ne estas membroj de la Bahaa Kredo.

## La Bahaa Templo

**Gravaj datoj**

| | |
|---|---|
| Fondoŝtono metita | 1912 |
| Konstrulaboro komenciĝinta | 1921 |
| Konstruado finita, malfermo | 1953 |

**Grandeco**

Nombro de sidlokoj en la aŭditorio 1 192

**Dimensioj**

| | *futoj, metroj* |
|---|---|
| Interna alteco de la aŭditorio | 138, 42 |
| Diametro de la kupolo | 90, 27,5 |

**Horaro**

Malfermita ĉiutage, senpaga eniro.

| | |
|---|---|
| Aŭditorio | 6:00 – 22:00 |
| Vizitcentro | 10:00 – 17:00* |

*Por la someraj horoj bonvolu informiĝi per la telefonnumero de la Oficejo de Aktivaĵoj, indikita sube.

**Ceremonioj:** Mallongaj preĝservoj okazas ĉiutage je la 12:30. Hispanlingva preĝservo okazas la unuan dimanĉon de ĉiu monato je la 2:30 posttagmeze.

**Grupvizito:** Por aranĝi gvidanton telefonu 847-853-2300. Ne necesas antaŭaranĝi viziton de individuaj personoj aŭ malgrandaj grupoj. La eniro estas ĉiam senpaga.

**Adreso:** 100 Linden Avenue
Wilmette, Illinois 60091

**Telefono:** (847) 853-2300
**E-poŝto:** how@usbnc.org
**Retadresoj:** www.bahaitemple.org, www.bahai.us aŭ www.bahai.org

Por pliaj informoj pri la Bahaa Religio en **Esperanto** rigardu: www.bel.bahai.de

***For more information in Esperanto:*** www.bel.bahai.de

*Tiun ĉi tradukon en la Internacia Lingvo Esperanto senpage preparis The Esperanto Society of Chicago*: http://www.esperanto-chicago.org

## Enirejaj kaj Alkovaj Surskriboj

La vizitantoj de la Templo trovos 18 citaĵojn el la verkoj de Bahá'u'lláh, enskribitaj super la enirejoj kaj alkovoj.

**SUPER LA ENIREJOJ:**

*La tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.*

*La plej amata el ĉiuj aferoj antaŭ Miaj okuloj estas Justeco; ne turnu vin for de ĝi se vi deziras Min...*

*Mia amo estas Mia fortikaĵo; kiu ĝin eniras estas protektita kaj sekura...*

*Eĉ ne flustru pri la pekoj de aliaj dum ankoraŭ vi mem estas pekulo.*

*Via koro estas Mia hejmo, sanktigu ĝin por Mia descendo.*

*Faris Mi la morton por vi ĝojportanto. Pro kio malĝojas vi?*

*Sur Mia tero menciu Min, por en Mia ĉielo Mi memoru vin.*

*Ho vi riĉuloj surtere! La malriĉuloj inter vi estas Mia konfido; gardu vi Mian konfidon...*

*La fonto de ĉia klero estas la scio pri Dio, altigita estu Lia Gloro.*

**EN LA ALKOVOJ:**

*Ĉiuj profetoj de Dio proklamas la saman kredon.*

*Religio estas lumo brila kaj forto nevenkebla.*

*Vi estas la fruktoj de unu arbo kaj la folioj de unu branĉo.*

*Tiel forta estas la lumo de l' unueco, ke kapablas ĝi ilumini la tutan teron.*

*Amike unuiĝu kun la kredantoj de ĉiuj religioj.*

*Ho Filo de l' Esto! Vi estas Mia lampo kaj Mia lumo estas en vi.*

*Ho Filo de l' Esto! Paŝadu laŭ Mia leĝaro pro amo al Mi ...*

*Via paradizo estas Mia amo, via ĉiela hejmo reunuiĝo kun Mi.*

*La lumo de bona karaktero superas la lumon de l' suno.*

